

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

julio / septembro 1993



## Dom zu St. Blasien

drittgrößte Kuppelkirche Europas  
eines der Ziele beim Ausflug der Jahresversammlung

---

**Nicht vergessen! Sofort anmelden!**  
**Zur Jahresversammlung in Titisee**  
**8. – 10. Oktober**

Anmeldevordrucke noch erhältlich bei GEFA-Sekretario Riehn, Richard-Dehmel-Str. 3, 67061 Ludwigshafen, Tel. 0621 582443,

Interessenten für die Sprachprüfung melden sich bitte umgehend an bei Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda, Tel. und Fax 0661 77627.

---

### Brila Internacia Fervoĵista Kongreso

Nacilingvaj afiŝoj kaj lokaj gazetoj anoncis en la itala banurbo Cervia, ke kongresos tie de la 6a ĝis 12a de junio 1993 esperantistaj fervoĵistoj. Disvolviĝis la 45a kongreso de la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEF), kiun modele organizis la Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio (IFEA). Aliĝis 469 anoj de la Internacia Lingvo el 24 landoj, inter ili 37 germanoj. Eksterordinara estis la kongresejo: brikŝtona iama salmagazeno el la 17a jarcento. Ĝia kapacito taŭgis senprobleme por plurcentaj vizitantoj, sed malpli por laborkunsidoj. Enlanda kaj kroata librovendejoj konkurencis pri la favoro de klientaro. Helpantoj presigis per komputiloj informojn kaj kongresbultenojn. La poŝto disponigis specialan stampon.

Post bone vizitita ekumena diservo en la katedralo oni kolektiĝis por la malfermo de la kongreso. Kuraĝigaj salutvortoj venis flanke de la honorgastoj. Precipe laŭdis la agadon de la esperantistoj la urbestro kaj la reprezentantoj de fervojo kaj de liber-tempa organizaĵo Dopolavoro Ferroviario. Antaŭ ol malfermi la kongreson, IFEF-prezidanto Per Engen atentigis pri la malfacila situacio, en kiu troviĝas la plej multaj landaj asocioj. Junaj muzikistoj ludis la Esperanto-himnon. Sekvis la emociaj salutoj de la landaj delegitoj, por Germanio esprimis ilin GEFA-prezidanto Joachim Giessner.

En la fervoĵfaka agado evidentiĝis, ke UIC, la Internacia Unio de Fervojoj, intencas ebligi al IFEF konkretan kunlaboron. Tio kondukos antaŭvideble al akcepto de esperantlingvaj terminoj en la venontaj eldonoj de la plurlingva UIC-vortaro. Krom altaj kostoj neceso forta kunlaboro de la Terminara Komisiono, kiu cetere unuiĝis kun la Fake Aplika Komisiono. Estas laŭdita la nacia fervoja vortaro, kiun eldonis GEFA antaŭ nelonge. GEFA-membro Dieter Hartig ellaboris ĝin modele. Alia sukceso: Esperanto estis praktikita kiel tria laborlingvo en la ĝenerala asembleo de la Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervoĵistoj (FISAIC). Ankoraŭ devos esti decidata, ĉu Esperanto daŭre fariĝos tria laborlingvo.

En sia fakprelego d-ro Serio Boschlin lerte traktis la atendotan evoluon de grandrapidaj fervojlinioj en Italio. Joachim Giessner flanke de GEFA raportis pri klopodoj de DB kaj aliaj fervojoj malpli altigi la bruon de la fervojo. Delegitoj de aliaj landoj konatigis novaĵojn de siaj fervojoj, ekzemple kiamaniere Svisaj Federaciaj Fervojoj transportas transite pezajn kamionojn. Esperantlingvaj klarigoj en la horaro eldonas ankoraŭ ok fervojoj.

Abunda estis la tagordo de la plenkunsido, kvankam ne okazis elekto de estraranoj. Kiel sekvo de la politikaj eventoj aliĝis al IFEF la novaj landaj asocioj Ĉeĥio, Slovakio



kaj Slovenio. Timiga estas la konstanta regreso de la IFEF-membraro, malĝojigaj la ĝenerala maljuniĝo kaj la valutaj komplik-ajoj en orientaj landoj. Per agadplano oni esperas plibonigi la situacion. La kultura programo ĝojigis precipe muzikamantojn. Juna orkestro, kantsolistoj kaj du ĥoroj prezentis altkvalitan muzikon. En la urbo-centro loka blorkestro invitis enloĝan-tojn kaj kongresanojn al publika koncerto. Publikan intereson trovis la inaŭguro de Esperanto-placo. Menciindaj estu ankaŭ la tro vigla dancmuziko sur nivelo de disko-teko okaze de la balo kaj la ĵazmelodioj dum la lasta vespero.

Du duontagaj kaj unu tuttaga ekskursoj ebligis konatiĝi kun la tiea regiono. Ravenna estis la unua celo, precipe la preĝe-joj kun siaj famaj mozaikoj el la kvina ĝis oka jarcentoj. En muzeo de Faenza altiris la atenton centoj da ceramikaj fajencoj. Termloko Brisighella restos en memoro precipe pro trihora restado en restoracio. Perŝipe la kongresanoj veturis al la banloko Cattolica. De tie ili atingis Gradara mez-epokan urbeton sur monteto. La ekskursoj kontentigis ĉiujn, ankaŭ la somera vetero. Venis la fino de la modele organizita kongreso. IFEF-prezidanto Per Engen esprimis nome de ĉiuj sinceran dankon al la ne la-cigebla LKK sub gvidado de la ĉiam afabla prezidanto d-ro Romano Bolognesi. La 45a IFEF-kongreso estis brila kaj sukcesplena. Intertempe invitis la aŭstraj gekolegoj al

la 46a IFEF-kongreso okazonta en Krems (Aŭstrio) de la 13a ĝis 20a de majo 1994. Sekvos Pécs (Hungario) en 1995 kaj Den Haag (Nederlando) en 1996. Detaloj estos publikigitaj en la IFEF-organo Internacia Fervojoisto.

110 postkongresanojn el 10 landoj atendis alloga turista programo. Ili ne devis ŝanĝi la hotelon, ĉar oni revenis ĉiun vesperon al la sama tranoktejo. Aliflanke la aŭto-busoj startis frumatene. La unua ekskurso kondukis al kooperacia entrepreno, kiu prilaboras vinberojn. La tutaĵo ne nur aspektis kiel granda, moderna fabriko, sed interne ĝi funkcias preskaŭ sen laboristoj. En Predappio la urbestro inaŭguris Espe-ranto-ŝtuparon; ĝi kondukas tra parko al la urbodomo. Vizito al la mezepoka Bertinoro kun sia elstara kastelo kompletigis la ekskurson. La vigla urbo Urbino, naskiĝ-loko de la fama pentristo Raffael estis alia celo. Vidindaj pentraĵoj en la alte situanta duka palaco. Frassasi famiĝis de post 1975 pro siaj mirindaj, apenaŭ pri-skribeblaj grotoj. Dum la lasta tago ŝipo transportis la ekskursantojn de la havenurbo Chioggia al Lido por denove inaŭ-guri Esperanto-straton, poste al insula monaĥejo, eklezia centro por armena kulturo, kaj fine al Venezia.

Estis impresigaj belegaj tagoj. Koran dan-kon al la afablaj organizantoj oni diris je la adiaŭo.

W. B.

### **Internationaler Esperanto-Kongreß in Italien**

Bei dem diesjährigen 45. Internationalen Kongreß der Eisenbahner- Esperantisten konnte dessen Präsident, der Norweger Per Engen, über 460 Teilnehmer aus 24 Ländern begrüßen. Als Tagungsort hatte der italienische Landesverband den Badeort Cervia an der Adria ausgewählt. Für die Veranstaltung, die vom 6. bis 12. Juni

1993 dauerte, bot sich das umgewandelte, ehemalige Salzmagazin aus dem 17. Jahr-rhundert an. Vertreter des öffentlichen Lebens, der Italienischen Eisenbahnen sowie deren Freizeitorganisation Dopola-voro Ferroviario sprachen sich anerken-nend über die Tätigkeit der Eisenbahner-Esperantisten aus. So betonte Direktor

Gianpietro Monfardini von der Direktion Bologna, für den Kontakt mit ausländischen Kollegen eigne sich vorzüglich die internationale Sprache Esperanto. Ähnlich äußerten sich auch die übrigen Ehrengäste bei der Eröffnung dieses 45. Kongresses. Jakob Tschanz als Vertreter des Internationalen Verbandes kulturpflegender Eisenbahner (FISAJC) wies darauf hin, daß dieser Verband Esperanto als dritte Arbeitssprache versuchsweise zugelassen habe. Die Grüße der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten und des Bundesbahn-Sozialwerks überbrachte deren Vorsitzender Joachim Gießner.

Als Erfolg ist zu bewerten, daß der Internationale Verband der Eisenbahnen (IIC) dem Internationalen Verband der Eisenbahner-Esperantisten eine ständige Zusammenarbeit ermöglichen will. Künftigen Ausgaben des mehrsprachigen IIC-Eisenbahnfachwörterbuches soll ein Esperanto-Teil angegliedert werden. Dem deutschen Landesverband wurde ein besonderes Lob zuteil, hat er doch kürzlich ein aktuelles Eisenbahnfachwörterbuch in beiden Sprachen herausgegeben, ein Verdienst, das vor allem Dieter Hartig zukommt. Einige Bahnen sind weiterhin bereit, in ihr Kursbuch Textteile in Esperanto aufzunehmen. Die italienischen Kollegen konnten mit einem Fachvortrag über die künftige Entwicklung ihres Hochgeschwindigkeitsnetzes aufwarten. Andere Delegierte berichteten über Neuerungen bei ihren Bahnen. Joachim Gießner schilderte die Maßnahmen der DB und anderer Bahnen zur Lärmbekämpfung im Eisenbahnbetrieb.

### **Willkommen in Krems**

Für die Anhänger der Internationalen Sprache ist das Treffen mit Gleichgesinnten wichtig. So freuen sich viele Eisenbahner und ihre Angehörigen schon jetzt

Der Kongreß fand positive Beachtung in der Presse. Die Bevölkerung wurde durch nationalsprachige Plakate zum Besuch einiger Veranstaltungen eingeladen. Sie fand sich auch zahlreich zu einem öffentlichen Konzert im Stadtzentrum ein. In Cervia wurde ein Esperanto-Platz eingeweiht. Die Post stellte einen Sonderstempel zur Verfügung. Das abendliche Programm richtete sich vor allem an die Freunde der Musik. Darbietungen von Solisten, Chören und eines Kammerorchesters fanden begeisterte Zuhörer. Zum Ball spielte eine flotte Tanzkapelle, und am letzten Abend begeisterten junge Jazz-Musiker. Die italienischen Kollegen boten zudem Ausflüge zu sehenswerten Zielen an. In Ravenna galt der Besuch den romanischen Kirchen mit ihren berühmten Mosaiken. In Faenza war vielfältige Keramikunst aus mehreren Jahrhunderten zu bewundern. Ein Sonder-schiff brachte die Teilnehmer nach Cattolica. Später waren sie auf der Burg des mittelalterlich geprägten Gradara auf den Spuren des Dichters Dante. Manche nutzten das Angebot des "Nachkongresses" mit Ausflügen in die Toskana, nach Urbino und zu den Tropfsteinhöhlen bei Frasassi. Den Abschluß bildete eine Fahrt mit Bus und Schiff in die Lagune von Venedig. Es war ein gelungener, unvergeßlicher Kongreß. Die Teilnehmer, darunter eine stattliche deutsche Gruppe, verabschiedeten sich mit herzlichem Dank von ihren Gastgebern. Bleibt noch anzumerken, daß der nächste Eisenbahner-Esperanto-Kongreß vom 13. bis 20. Mai 1994 in Krems a. d. Donau (Österreich) stattfindet. W.B.

auf den nächsten Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten. Eingeladen haben die österreichischen Kollegen. Eine Woche lang, vom 13. bis 20. Mai 1994, sind wir

Gäste in der niederösterreichischen Stadt Krems an der Donau. Krems blickt auf eine fast tausendjährige Geschichte zurück. Sein historisches Zentrum mit bemerkenswerten Bauten im gotischen und barocken Stil wurde mit dem Preis "Europa Nostra" ausgezeichnet. Die Stadt liegt inmitten der Wachau, weithin bekannt durch ihren Weinanbau.

Der 46. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) wird im Messegelände und im Stadtsaal stattfinden. Für den Ball haben die Veranstalter das romantische Schloß Grafenegg vorgesehen. Bei den Sitzungen werden organisatorische Probleme behandelt und eisenbahnfachliche Vorträge gehalten. Delegierte der Landesverbände berichten, ebenfalls in Esperanto, über Neuerungen bei ihren Bahnen.

Im kulturellen Beiprogramm erleben wir österreichische Musik und Folklore. Ein Halbtagesausflug führt, vorbei am berühmten Stift Melk, zur mittelalterlichen Donaufestung Dürnstein. Hoch über dem Ort erhebt sich die Burgruine aus dem 12. Jahrhundert, in der einst Richard Löwenherz gefangengehalten wurde. Mit dem Schiff geht die Fahrt zurück nach Krems. Eisenbahn-Fans werden sich besonders auf den Ganztagesausflug freuen. Zunächst wird St. Pölten angefahren, wo übrigens die meisten deutschen Teilnehmer zum Kongresssort Krems umsteigen. Dort wird ein

Sonderzug bestiegen. Er fährt auf der reizvollen, bereits seit 1911 elektrisch betriebenen Schmalspurstrecke (760 mm) bis zum bekannten Wallfahrtsort Mariazell (85 km). Im Buffetwagen warten Speisen und Getränke auf fröhliche Gäste.

Das Programm des internationalen Esperanto-Kongresses, das hier nur skizziert werden kann, verspricht alle Erwartungen zu erfüllen. Vor allem können wir uns wieder mit Freunden und Kollegen aus ganz Europa ohne Verständigungsschwierigkeiten unterhalten.

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk empfiehlt daher, an dieser Veranstaltung zahlreich teilzunehmen, zumal zur Kongreßstadt gute Zugverbindungen bestehen.

Anmeldevordrucke werden von den Bezirksbeauftragten verteilt. Bitte beachten Sie, daß der ermäßigte Kongreßbeitrag von etwa 100 DM nur bis zum 31. Dezember 1993 gilt. Anschließend beträgt er 130 DM. Die Gebühr für die Zimmervermittlung ist obligatorisch und kostet 50 Ö. Schillinge = 7.50 DM (pro Person). Die beiden Ausflüge (14.50 DM bzw. 29 DM) sowie das Bankett (32.20 DM) können vor Ort bezahlt werden. Auf Wiedersehen im Mai 1994 in Krems, wo Sie herzlich willkommen sind.

W. B.

Kiel vi povas legi en la raporto en ĉi tiu Bulteno, la venonta kongreso okazos en Krems (Aŭstrio). Por ŝpari altajn bankkotojn por unuopaj ĝiradoj, ni interkonsentis kun LKK, kolekti la kongreskotizojn plus prezo por la ĉambroperado de la germanaj kongresanoj kaj komune transĝiri ilin al LKK. Ni rekomendas al vi, utiligi tiun eblecon. Aligu kiel kutime, sed ekzakte rimarkigu en la aliĝilo, ke la kongreskotizon kaj la ĉambroperadon (7,50 DM) vi ĝiris al la germana kotiz-kolekta konto.

Se vi intencas uzi tiun favoran ĝiradon, ĝiru ĝis plej malfrue 30.11.93 al Hans-Jürgen Riehn, Konto 200 664 634 Sparda-Bank Karlsruhe, BLZ 660 905 00. Sed ne forgesu, klare informi la GEFA-sekretarion Riehn pri via pagado. Lia adreso: Richard-Dehmel-Str. 3, 67061 Ludwigshafen, Tel. 0621/58 24 43.

Ĝirotajn sumojn, kiuj alvenos post la 30.11., ni denove kolektos ĝis 05.01.1994. Poste ni ne plu akceptos, sed reĝiros je-koste de la ĝirinto. GEFA



## GEFA-Senioren in Duisburg

Der Frühling hatte sich bereits eingestellt, als sich die getreuen GEFA-Senioren am 22. April 1993 in einer Gaststätte beim Hauptbahnhof Duisburg zu ihrem alljährlichen Treffen einfanden. Rolf Terjung, der die organisatorische Nachfolge der verdienstvollen Elfriede Kruse angetreten hat, hieß die 27 Anwesenden herzlich willkommen. Die Teilnehmer erhielten neben einem Überblick über die Entwicklung der Großstadt Duisburg auch Informationsmaterial in Esperanto. GEFA-Vorsitzender Joachim Gießner begrüßte die versammelten Damen und Herren. Bei dieser Gelegenheit erlebte das neu erschienene Eisenbahnfachwörterbuch Esperanto - Deutsch / Deutsch - Esperanto seine erste öffentliche Vorstellung. Über dieses beachtenswerte Werk von Dieter Hartig wird noch besonders berichtet. Nach einem ausgiebigen Mittagessen mit anschließendem Kaffeegedeck folgte ein Spaziergang zur Innenstadt, ehe die zufriedenen Senioren wieder die Heimfahrt antraten. Für das gelungene Treffen ist dem Ehepaar Terjung herzlich zu danken. Wir freuen uns auf das nächste Frühjahrestreffen.

W. B.

## Ni funebras pri Hanna Schindler

La 29an de junio 1993 forlasis nin nia fervora membrino Hanna Schindler en aĝo de 64 jaroj. Kun ŝi ni perdis homon, kiu, kvankam ne mem fervojistino, fidele kaj senbrue oftege helpis kaj kontribulis per pozitivaj ideoj dum jardekoj en nia germana fervojista movado, ĉiam je la flanko de sia edzo Heinz. Ili estis konata paro en la IFEF-kongresoj kaj GEFA-jarkunvenoj. Sed ankaŭ en sia urbo Schweim ŝi estis ŝatata kunlaborantino en multaj lokaj socioj kaj zorgis precipe por maljunuloj.

Kun granda pacienco ŝi portis longdaŭrajn malsanon kaj dolorojn. La vicprezidanto de GEFA, Rösemann, diris la adiaŭajn vortojn ĉe la tombo. Krome ĉeestis la GEFA-sekretario Riehn, la distriktkomisiito por Köln, Herltze, kaj multaj aliaj geamikoj de Hanna. GEFA profunde kondolencas al Heinz Schindler kaj familio kaj deziras al ili forton por travivi tiun amaran perdon. GEFA kaj ŝiaj multnombraj amikoj ne forgesos Hanna Schindler.

Prezidanto

## Fervojaĵ novaĵoj

### Amsterdam

Reformo estas planita ankaŭ por Nederlandaj Fervojoj (NS). Ekde januaro 1994 la entrepreno dispartigos en tri memstaraj kaj memresponsaj branĉoj: pasaĝertrafiko, vartrafiko, infrastrukturo kaj kapacitomanagerado.

### Berlin

Ĝis la jaro 2000 estos finkonstruita la nova centra stacio en la germana ĉefurbo. Sur areo de la ĝisnuna stacio Lehrter

Stadtbahnhof ekestos dunivela stacio. En la supra ebena estos koncentrata la trakaro de la direkto orienta-okcidenta inkluzive interurban trafikon, dum la linioj de la direkto norda-suda kruciĝas rektangule sub la supra stacio.

### London

Ekde 1997 trafikos inter la ĉefurba Flughaveno kaj la urbocentro tra tunelo elektraj eksprestaraĵoj, kiuj jare povos transporti ses milionojn da pasaĝeroj.

### **Frankfurt am Main**

De post januaro 1993 en la Eŭropa Komunumo (EK) povas esti libere interŝanĝataj varoj, kapitalo kaj servoj. La fervojoj, ŝarĝitaj de teknikaj kaj organizaj diferencoj, novorganizis la t. n. kombinitan kargotrafikon en formo de "aksa manaĝerado"

### **Paris**

Fine de 1993 komenciĝos la naveta trafiko por aŭtomobiloj kaj kamionoj tra la submara fervojtunelo inter Francio kaj Britio. Danĝeraj varoj estos transportendaj plue per pramŝipoj. La pasaĝertrafiko sekvos en 1994.

### **Stockholm**

Svedaj Fervojoj (SJ) atendas gravajn problemojn, ĉar la Fervoja Oficejo, kompetenta de post 1988 por la itinero, intencas disponigi itineraĵajn kapacitojn kontraŭ pago ne nur al SJ, sed ankaŭ al konkurencaj entreprenoj.

### **Tokio**

JR East, la plej elstara el la ses japanaj fervojkompanioj, kontraktis kun la Germanaj Fervojoj, celante interŝanĝon de spertoj en la grandrapida pasaĝertrafiko.

### **Berlin**

4 300 km el 14 000 km de DR-fervojoj estas elektrizitaj kaj kunigitaj kun la DB-fervojoj. De post la somerhorarŝanĝo 1993 ICE- kaj IC-trajnoj povas veturi sur plene elektrizitaj trakoj inter München, Frankfurt kaj Hannover al Berlin.

### **Budapest**

Pro kreskanta kombinita trafiko veturas nuntempe kvinfoje po semajno la t. n. sistemtraĵoj inter Bremen kaj Ĉeĥio respektive Hungario.

### **Frankfurt am Main**

Telekom, filio de germana poŝto, sukcesis per speciala metodo, ke oni povas seninterrompe telefoni en grandrapidaj trajnoj, kiam tiuj traveturas tunelon.

### **Klaipėdo (Litovio)**

Pramŝipoj trafikantaj inter la fervojaj havenoj Mukran (insulo Rügen) kaj Klaipėda baldaŭ transportos eksportajn personaŭtojn en ambaŭ direktoj. La stacio Mukran disponas pri 40 km da larĝŝpuraj kaj 70 km da normalŝpuraj trakoj.

### **London**

La itinero por la projektita trako inter la submara tunelo ĉe Folkstone kaj London estas definitive fiksita. Post permeso de la brita parlamento la laboroj povos komenciĝi supozeble en 1995.

### **Madrid**

Hispanaj fervojoj (RENFE) intencas konstrui pliajn 1 100 km da normalŝpuraj trakoj por la grandrapida trafiko. Inter ili troviĝas la multe diskutita linio de Madrid tra Barcelona al Francio (PortBou).

### **Paris**

De post septembro 1993 trafikos grandrapidaj TGV-trajnoj inter Paris kaj Calais. En 1994 ekveturos Eŭrostar-trajnoj inter Paris kaj London tra la submara tunelo. Plursistemaj TGV-trajnoj bezonos ekde 1996 inter Paris kaj Bruxelles unu horon kaj ĝis Köln kvar horojn.

### **Tokio**

Por la kurtistanca pasaĝertrafiko estas novkonstruitaj malpli pezaj, prefavoraj vagonoj. Post nur 13jara uzado necesas ĝenerala ekzameno resp. definitiva eksservigo.

Kompil. el "Blickpunkt Bahn" 4 kaj 6 / 93 de W. B.

## Ein musikalischer Genuß

### Kantoj de'l popolo, prezentitaj de'l popolo

Auf der Grenzlinie zwischen zwei Kulturkreisen liegt das Land der Slowaken. Obwohl auch sie von der sozialen und industriellen Entwicklung der Neuzeit nicht unberührt bleiben konnten, ist es ihnen gelungen, den Charakter ihres Landes weitgehend zu bewahren. Dieses Land besteht zu einem großen Teil aus Gebirgen, Wäldern, Grünflächen und Flüssen. Noch spielt die Natur eine wichtige Rolle, noch praktizieren die Menschen da und dort, was schon die Altvorden taten. Noch leben wilde Tiere hier und da in den Wäldern. Und noch lieben es die Menschen, ihre alten Lieder zu singen.

21 Lieder aus diesem unerschöpflichen Melodienschatz wurden zusammen mit slowakischen Musikanten ausgewählt. Sie wurden - gesungen in Esperanto - von einem namhaften Folklore-Ensemble und einem der besten slowakischen Chöre auf Musikkassette und CD eingespielt. Es lohnt sich, diese auch technisch einwandfrei ge-

botenen Lieder, ihre Harmonie und Inhalt zu hören. Sie erzählen von Freude und Traurigkeit, von Liebe und Schmerz, von der Schönheit des Landes und dem Stolz seiner Bewohner.

Sowohl der Musikkassette als auch der CD sind sämtliche Texte in Esperanto beigegeben. Die Übersetzung besorgte Joachim Gießner, Präsident von GEFA, mittels einer besonders entwickelten Methode. Herausgeber ist KAVA-PECH, Dobrichowice (Praha). Der Preis wurde absichtlich niedrig gehalten, um auch den Menschen in den östlichen Ländern den Kauf zu ermöglichen. Für die westlichen Länder beträgt er für die MC 10 DM, für die CD 15 DM, zuzüglich Versandkosten. Bezahlung nach Erhalt. Bestellungen richten Sie bitte an Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, D-37412 Herzberg, Tel. 05521/4586, Fax 73313.

Sehr empfehlenswert für Gruppenveranstaltungen und als persönliches Geschenk.

### Interesse für Eisenbahnmotive

Die Zeitschrift "Der Eisenbahn-Motivsammler" Nr. 100 hat eine neun Seiten lange Abhandlung über die deutschen Eisenbahner-Esperantisten, über Esperanto-Kongresse und Briefmarken und über Sonderstempel mit Esperanto- und Eisenbahnmotiven veröffentlicht. Als Grundlage hat die 1985 erschienene Sonderausgabe des "Bulteno" "Die deutschen Eisenbahner-Esperantisten im Wandel der Zeiten" gedient.

Der Artikel bringt eine Darstellung der Entwicklungsgeschichte von GEFA und ein

Verzeichnis aller Jahresversammlungen. Nicht weniger als 45 Sonderstempel, Motivmarken und Ganzsachen sind auf diesen neun Seiten abgedruckt, die alle in Zusammenhang mit GEFA-Jahresversammlungen und IFEF-Kongressen stehen. Eine erfreuliche Würdigung dieser willkommenen, aber kostspieligen "kleinen Nebensache". Nur Leute, die schon solche Veranstaltungen organisiert haben, wissen um die zeitraubenden Schwierigkeiten, die diese "kleine Nebensache" verursacht, immerhin zur Freude vieler Menschen. Jogi

---

Redaktofino por n-ro 4/93 estos 05.11.1993

Herausgeber/eldonanto: Bundesbahn-Sozialwerk, Hauptvorstand Frankfurt am Main

Schriftleitung/redakcio: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz

Redaktion: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 3, 28199 Bremen

Druck/preso: Druckerei u. Verlag Otto Zander, Lindenstr. 16, 37412 Herzberg am Harz

---